

Esperantistoj migris tra la iama respubliko „Botelkolo“ aŭ tuttage konversacii kun interesaj homoj kaj samtempe ekzerci la korpon

Ĉu vi ne scias, kie situas tiu respubliko? Tiam vi verŝajne ne apartenis al la 25 esperantistoj el kvar landoj, kiuj partoprenis la 2an Esperantistan Migradon Aŭtunan (2a EMA). La aranĝo de GEA okazis de la 30a de septembro ĝis la 5a de oktobro.

En aŭtuna suno de la meza Rejnlando la grupo migris sub lerta gvidado de Rudolf Fischer. De Kaub en kvar etapoj la grupo iris al Rüdeseim, ĉiam sur la fama kaj intertempe tre populara migropado „Rheinsteig“ renkontante belegajn panoramojn, imponajn burgojn kaj multkolorajn vitejojn. Ofte la internacia grupo renkontis vinberrikoltantojn, de kiuj ili ricevis kelkajn berojn por gustumi.

Vidinte la verdajn flagojn ĉe la grupo kaj aŭdinte „iun strangan lingvon“ la preterpasantoj alparolis la grupon kaj montris intereson pri nia lingvo. Ne malofte anoj de la grupo donis survojan kurseton pri la lingvo.

Vespere la partoprenantoj de la 2a EMA aŭskultis prelegojn de Petro Chrdle kaj Rudolf Fischer. Chrdle prelegis pri sia libroeldonejo kaj la vivo de la fratoj Ĉapek. Fischer raportis pri siaj spertoj sur la Jakoba vojo en Hispanio. Samtempe ni povis ĝui la belan noktan panoramon desur nia tranoktejo, la Elsenburg en Kaub.



Fine mi volas solvi la enigmon pri la respubliko Botelkolo: Post la unua mondmilito la venkintoj kreis trans la Rejno du pontokapojn inter Koblenco kaj Majenco sur la maldekstra rejna bordo, okupita de Francujo, kaj la dekstra riverbordo administrata de la Vajmara Respubliko kun radiuso de po 30 km. Inter ambaŭ restis neokupita tereno en formo de botelkolo sen rekta ligo al la cetera Vajmara Respubliko. La homoj en tiu landstrio administris sin memstare de 1919 ĝis 1923. La botelkolanoj relative bone vivis en tiu „libera ŝtato“ vivtenante sin ĉefe per kontrabandado inter la franca okupita zono kaj la Vajmara Respubliko. Hodiaŭ ekzistas vigla iniciativo de homoj kaj entreprenoj, kiu uzas tiun „markon“ en turismo.

La venontjara 3a EMA okazos ĉe la Mozelo apud Zell. Ni jam fiksis la daton: de dimanĉo, la 6a, ĝis vendredo, la 11a de oktobro 2013.

Wolfgang Bohr

